

VENEZUELA

STELO

Organo de **VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO**
32-a Jaro = N. 75 = 2-a Semestro 2004

ISSN 1316-0451

JARFINAJ MEDITOJ

Persono bonintenca kaj aplomba ne devus penti kiam, ĉe la fino de la jaro, farante taksadon pri sia agadoj dum la tuta jaro, konkludas ke li ne plenumis ĉiujn taskojn, ke restas ankoraŭ aferoj farendaj, ke li ne sukcesis ŝanĝi la ne justajn kaj torditajn situaciojn, kvankam honeste li faris sian eblon kaj eĉ ion pli.

Tamen li ne estas kontenta; male, li estas malĝoja. Li promenas sur la stratoj, kaj sur la trotuaroj renkontas serion da almozpetantoj; ĉe la krucvojoj, junuloj, knaboj kaj knabetoj kelkfoje klaŭne vestitaj, ofte mallerte sed en okazoj preskaŭ profesie ĵonglas antaŭ la haltantaj veturiloj, por gajni malabundajn monerojn. La televido, la radio, la ĵurnaloj raportas pri sangaj akcidentoj kaj pri krimaj okazintaĵoj (certe pri tio ne kulpas la komunikmedioj), kaj la raportistoj el proksimaj kaj malproksimaj landoj informas pri la ĵusaj terorismaj atakoj, aŭ pri la lastaj militaj operacioj, kaj pri la konstantaj hombuĉadoj en iu aŭ alia mondoparto.

La homaro, dum sia tuta historio, konis kaj suferis la malbenon de teruraj militoj kaj sinmortigaj frenezoj, sed ŝajne ne sciis lerni la lecionon, nek eltiri la evidentajn konkludojn el la komparo inter detruo kaj konstrui, inter forpuŝi kaj akcepti, inter malami kaj ami, inter soleci kaj kunesti. La homoj malsame parolas, malsame sin esprimas, sed idente spiras kaj tute same reagis antaŭ la doloro kaj la morto. Kial, do, ili ne sxanĝas sian sintenon? Eble iuj havas motivojn por ne ami la vivon; sed kial ili devas impliki la aliulojn?

Oni demandas al si mem ĉu jam ne estas tempo por rektigi la torditajn vojojn, unuiĝi por trovi kune taŭgajn solvojn al komunaj problemoj, interparoli per unu komuna lingvo por kompreni kaj akcepti unu la alian, flankenlasi la imperiismajn pretendojn kaj

ekkonstrui novan mondan ordon. La homaro bezonegas sinceran porĉiaman pacon kaj nepre devas konstrui ĝin, ne forgesante ke, laŭ la vortoj de Oskar Romero, ĉefepiskopo de Salvadoro, "Paco ne estas rezulto de la teruro aŭ de la timo. Paco ne estas la silento de la tombejoj. Paco ne estas la rezulto silenta de iu violenta subpremo. Paco estas la malavara, trankvila kontribuo de ĉiuj por la bono de ĉiuj. Paco estas dinamismo. Paco estas oferemo. Ĝi estas rajto kaj estas devo".

Andrés Turrisi

<p style="text-align: center;"><u>VENEZUELA STELO</u> VENEZUELA Apartado 47675, Caracas 1041 – A http://www.esperanto-ve.org esperanto-en-venezuela@yahoo.com</p> <p><u>REDAKCIA KOMISIONO:</u> Félix García Blázquez, Jorge Mosonyi, Esperanza Pérez, Andrés Turrisi.</p> <p><u>ELDONANTO: FUNDAESPERANTO</u></p> <p style="text-align: center;"><u>VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO</u> Apartado 47675, Caracas 1041 – A http://www.esperanto-ve.org ven_esperanto@yahoo.com</p> <p><u>ESTRARANOJ:</u></p> <p>PREZIDANTO: Andrés Turrisi HONORA PREZIDANTO: Juan E. Bachrich VIC-PREZIDANTO: Jorge Mosonyi ĜENERALA SEKRETARIINO: Esperanza Pérez KASISTO: Juan E. Bachrich.</p> <p><u>KOMISIITOJ:</u></p> <p><u>BIBLIOTEKO KAJ LIBROSERVO:</u> Peter Jaimez. <u>KORESPONDAJ KURSOJ, ELDONADO KAJ PROTOKOLADO,</u> <u>VENEZUELA STELO:</u> Andrés Turrisi.</p> <p><u>KONSILANTOJ:</u> Félix García Blázquez, Esteban Mosonyi, Alfredo Portillo.</p> <p><u>HONORAJ MEMBROJ:</u> Juan E. Bachrich, Fernando De Diego <u>ENLANDAJ DELEGITOJ:</u> Héctor Delgado T. (Mérida), Alfredo Ovalles (Maracay), Germán Montero (Maracaibo), Jesús R. Cedeño (Maturín kaj Ciudad Bolívar).</p> <p><u>JUNULARAJ AFEROJ:</u> Yuri Yakimec</p> <p><u>ALIĜINTA ASOCIO:</u> ZULIA ESPERANTO-ASOCIO.</p>	<p><u>ATENTIGO</u></p> <p>Pri la enhavo de niaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj.</p> <p>Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio.</p> <p>Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene re-publikigataj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.</p> <p>Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.</p>
--	--

NACIAJ NOVAĴOJ

La 20-an de novembro okazis la jara Ordinara Asembleo de Venezuela Esperanto-Asocio. Oni analizis la stagnantan staton de la movado en nia lando, kaj la diversajn kaŭzojn. Precipe pro la sendifino

de la politika kaj socia-ekonomia situacio, ni restis longe neaktivaj, atendante pli favorajn tempojn por eklabori. Ni devas agnoski ke ofte ni ne faris nian eblon, kvankam ankaŭ oni devas koncedi ke ĉimomente la homoj emas prioritare okupiĝi pri konkretaj bezonoj kaj flankenlasas ĉiuspeciajn ideologiajn entreprenojn. Reĝas ĉiunivele la politikaj kredoj, kiuj sukcesis, kiel neniam antaŭe, apartigi kaj malamikigi la homojn. Nun fine ni eliris el la balotadaj vetkuroj, kaj jam ni povos rigardi en alian direkton. Ni faris al ni la sinceran proponon komenci labori por iom post iom reakiri la honoran pozicion kiun fiere ni konkeris en pasintaj jaroj, kaj denove establi la venezuelan Esperanto-movadon kiel ekzemplon por niaj najbaroj en Hispanameriko.

* * * * *

Nia dispono serioze labori por Esperanto puŝis nin esplori la eblecojn eldonigi aron de gravaj verkoj de la nacia heroo Simón Bolívar, esperantigitaj de diversaj membroj de nia Asocio. Okaze de vizito farita de kelkaj estraranoj de Fundaesperanto kaj VEA al la Bolivara Societo de Venezuelo, ĉi ties Prezidanto, Kolonelo Arturo Castillo, montris grandan intereson pri la projekto, kaj promesis sian helpon. Li prezentos la ideon al la koncerna estraro, kaj intertempe petis artikolon pri Esperanto, kiun li intencas aperigi en la Revuo de la Societo.

* * * * *

Nia membro, Prof-ro Juan Negrete, gvidas Esperanto-kurson en la Centra Universitato de Venezuelo. Kiel jam dum la pasinta semestro, la kurson partoprenas kontentiga grupo da gelernantoj. Prof-ro Negrete jam planas trian sinsekvantan kurson.

* * * * *

Kun laŭdinda sindediĉo, Prof-ro Negrete daŭrigas en la asocia sidejo la aktivadojn de Konversacia Rondo. Ni surprize konstatis la efikon de tiaj konversacioj en la evidenta pliboniĝo de la parolkapablo de la gelernantoj.

* * * * *

La 10-an de novembro, danke al la alpaŝoj faritaj de Prof-ro Juan Negrete (nedudeble, li estas la plej aktiva membro de nia asocio), profesoroj kaj gestudentoj de la Pedagogia Instituto de Karakas povis viziti ekspozicion de libroj kaj revuoj en Esperanto. Ni klopodas altiri la atenton sur la Internacian Lingvon kaj sur la Movadon ĝenerale.

* * * * *

La 23-an kaj 24-an de novembro nova ekspozicio de libroj kaj revuoj en kaj pri Esperanto funkciis en la Biblioteko de la Instituto por la Profesia Plibonigo de la Magisterio/Eksperimenta Pedagogia Universitato "Liberatoro" (UPEL). La ekspozicion, kiun ni ŝuldas al la persona agado de Prof-rino Teresa Osorio, Prezidantino de Fundaesperanto, amase vizitadis estraranoj, funkciuloj, docentoj kaj studentoj de la Instituto. Gravuloj de la institucio favore komentis la eventon, kaj sin montris pretaj starigi kunlaborajn kontaktojn en la estonto.

* * * * *

La 10-an de decembro, kiel jam tradicie ĉe Familio Bachrich, ni kunvenos en la Zamenhofan Vesperon por festi la naskiĝdatrevenon de nia Majstro. Temas pri solenaĵo okaze de kiu, en aparte agrabla etoso, kunvenas esperantistoj kaj simpatiantoj el diversaj urboj de la Lando, por pritrakti diversajn movadajn temojn kaj neformale babiladi: iaspeca tutlanda rendevuo.

INTERNACIAJ NOVAĴOJ

La 89-a Universala Kongreso ĉijare okazis en Pekino, de la 24-a ĝis la 31-a de julio. Partoprenis 2031 esperantistoj el 51 landoj. La organizintoj faris mirindan laboron, kaj la partoprenintoj revenis al siaj landoj kaj hejmoj kun la emocio esti partoprenintaj unuarangan tutmondan eventon.

* * * * *

Ankoraŭ kun freŝaj impresoj pri la Pekina UK, jam oni entuziasmiĝas pri la venontjara 90-a Universala Kongreso kiu okazos en Vilnius, Litovio, de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2005. Ni konstatis el la informoj ĉiutagaj aperintaj en la reto, ke la tieaj samideanoj laboregas tre profesie kaj kun konkretaj atingoj, kiuj donas ne nur la esperon, sed eĉ la certecon ke la supera evento de la monda esperantismo rezultos aparte sukcesa. Gratulojn al la membroj de la KKK kaj al ĉiuj esperantistoj en Litovio, al kiuj ni deziras grandiozan rikolton.

* * * * *

Inter la 14-a kaj la 21-a de aŭgusto 2004, kongresis en Bratislava (Slovakio) du gravaj internaciaj organizoj: Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kun pli ol 140 partoprenantoj, kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kun 49 partoprenantoj. La esperantistoj aŭdigas siajn voĉojn ne nur hejme, en siaj propraj landoj, sed ankaŭ in internaciaj medioj kaj lokoj.

* * * * *

Sed internaciaj kaj naciaj kongresoj ne okazas nur en la aliaj kontinentoj kaj en foraj landoj. De la 13-a ĝis la 15-a de novembro, en nia najbara Kolombio, la tieaj geesperantistoj celebris sian 10-an tutlandan kongreson, kiu okazis en Popajano. La evento estis sukcesa, spite al multaj malfacilaĵoj, kaj el ĝi niaj kolombiaj samideanoj eliris kun granda entuziasmo kaj kun la plej bonaj intencoj regajni la perditan tempon. La nova Prezidanto de Kolombia Esperanto-Ligo, Prof-ro Luis Santos Morales, jam eklaboris, kaj en siaj tujaj agadoj estas la reaperigo de iam prestiĝa publikigaĵo: Andaj Ondo.

* * * * *

Kaj la kubaj esperantistoj jam havas daton por la Kvina Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio: de la 3-a ĝis la 6-a de marto 2005. La Kongreso havos kiel temon "Esperanto: Realo kaj estonteco", kiu estas de nun rekta invito al pridebatoj de la aktuala situacio de la Esperanta movado kun ties sukcesoj kaj atingoj, kaj de ĝia rolo en la estonteco.

* * * * *

MENSAJES DIRIGIDOS A LOS ESPERANTISTAS Y SIMPATIZANTES VENEZOLANOS

Queridas amigas, Estimados amigos del Esperanto,

La finalidad de la Asociación Venezolana de Esperanto es promover la divulgación del Esperanto en nuestro País y dar a conocer los valores de nuestra cultura, historia y costumbres en el mundo entero por medio del Idioma Internacional.

Es obvio que, para lograr estos objetivos, la Asociación necesita la colaboración de sus miembros y simpatizantes, y es por eso que les pedimos se hagan miembros de la Asociación y/o de la Fundación Cultural Esperanto (FUNDAESPERANTO).

El propósito de FUNDAESPERANTO es desarrollar actividades culturales relacionadas con el Esperanto, y recabar fondos para el financiamiento de la sede y las actividades de la Asociación.

CUOTAS ASOCIATIVAS PARA EL AÑO 2005

1.- ASOCIACION VENEZOLANA DE ESPERANTO:

MIEMBROS ACTIVOS (MA):

Una (1) cuota anual de Bs. 70.000 ó

Dos (2) cuotas semestrales de Bs. 38.000 ó

Cuatro (4) cuotas trimestrales de Bs. 20.000

ESTUDIANTES Y FAMILIARES (E/F) DE LOS MA:

El 50% de la cuota para los MA

MIEMBROS PATROCINANTES (MP):

Además de la cuota AM pagan Bs. 7.000 mensuales

ESPERANTISTAS DEL INTERIOR U OTROS AMIGOS DEL ESPERANTO:

Una (1) cuota anual voluntaria de no menos de Bs. 35.000

NOTA: CANCELANDO ANTES DEL 31.01.2005, LA CUOTA UNICA ANUAL PARA EL 2005 SERA' DE Bs. 60.000.

2.- FUNDACION CULTURAL ESPERANTO (FUNDAESPERANTO)

Una (1) cuota única anual de Bs. 60.000

Los miembros honorarios no cancelan cuota alguna.

IMPORTANTE: Las cuotas asociativas podrán pagarse:

a) directamente a la Tesorera de ambas instituciones, Sra. Esperanza Pérez

b) con depósito en la Cuenta Corriente N° 01380020130200004778 del Banco

Plaza *, para la Asociación Venezolana de Esperanto

c) con depósito en la Cuenta de Ahorro N° 0105-0659-02192-3 del Banco Mercantil*, para la Fundación Cultural Esperanto *

*** Favor informar al teléfono 0212 = 986.71.18 el número del comprobante de depósito, la cuenta bancaria, el monto y el nombre del depositante.**

MANIFESTO AL INSTRUISTOJ DE LA TUTA MONDO

INTERNACIA KONFERENCO PRI ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LERNEJOJN

(Hungara teksto en flugfolio eldonita de Hungara Esperanto-Asocio en 1922.

(Al Esperanto tradukis Jorge Mosonyi)

En aprilo 1922 kunsidis en Ĝenevo internacia konferenco, kun partopreno de specialistoj pri edukado kaj oficialaj landaj reprezentantoj, por pritrakti la enkondukon de la instruado de Esperanto en la lerneajn programojn. La prezidanto de la konferenco estis Pierre Bovet, profesoro de la Ĝeneva Instituto Jean-Jacques Rousseau kaj fama pedagogo, kiu, estinte senpartia juĝanto dum la antaŭpreparado de la konferenco, fariĝis entuziasma esperantisto. La konferencon malfermis Sir Eric Drummond, sekretario de la Ligo de Nacioj, kiu dum sia salutparolado deklaris, ke la Ligo de Nacioj, trovinte en Esperanto valoran helpilon, pretigas ampleksan raporton pri la nuna situacio de Esperanto.

La temaro de la konferenco estis jena: 1) Logika valoro de Esperanto; 2) Morala valoro de Esperanto; 3) Instrumetodoj; 4) Rezolucioj. Ni ne celas detale konatigi la eksterordinare variajn kaj riĉenhavajn disertaciojn kaj pridiskutojn: la rezulto de ĉio ĉi legeblas en la suba Manifesto. Ĉi tie ni limiĝas al la mencio de kelkaj donitaĵoj, kiuj atestas la disvastiĝon de Esperanto, kaj la intereson pri ĝi montriĝantan en edukaj medioj.

S-ro Ditterle, delegito de la Ministerio pri Internaj Aferoj de Germanio anoncas, interalie, ke ekzistas Esperanto-grupoj en pli ol 200 urboj de Germanio. Elĉerpiĝis pli ol 500.000 Esperanto-instrulibroj. Ĝis nun oni instruis Esperanton en lernejoj de 223 urboj, kaj ĝi estos enkondukata en pliajn 52 post pentekosto.

S-ro Page, prezidanto de Brita Esperanto-Asocio, informas pri Esperanto-instruaj eksperimentoj, kiuj estis subvenciitaj de la registaro per 50 sterlingaj funtoj. Nuntempe Esperanto estas deviga studobjekto en lernejoj de 18 urboj.

Laŭ S-ro Alessio, delegito de la Itala Ministro pri Edukado, en Italio studis Esperanton 14.000 homoj, kaj staras je dispono 5.300 instruistoj. Nuntempe Esperanto estas instruata en 69 klasoj entute al 2.496 lernantoj.

S-ro Sevenhuijsen, delegito de la nederlanda Ministro pri Edukado, informas ke oni faris kursojn en 95 urboj. Staras je dispono 250 diplomitaj Esperanto-instruistoj, kaj studas 950 lernantoj en 60 diversaj klasoj.

Laŭ la ĉina delegito Kenn, funkcias oficiala Esperanto-kurso en la Pekina universitato kaj en 5 teknikaj lernejoj.

S-ro Usami, delegito de la japana ministerio pri eksteraj aferoj, deklaras ke la japana parlamento prenis favoran decidon pri Esperanto, kaj komisiis al la ministro pri edukado la preparon de la enkonduko de Esperanto en la studprogramon.

Post detala ekzameno kaj pridiskuto de la programpunktoj, la Konferenco rezumis la rezultojn de sia laborado en la sekvanta Manifesto, kaj ĝin lanĉas al la pedagogoj de la tuta mondo.

M A N I F E S T O

Ni, pedagogoj venintaj el 28 landoj, kaj registaraj delegitoj de 16 landoj, kiuj kunvenis en la sekretariejo de la Ligo de Nacioj en Genevo, sendas fratecan saluton al ĉiuj niaj kunlaborantoj en la tasko lumigi la spiritojn.

Ni estas konvinkitaj, ke ĉefa kŭzo kaj bazo de tiu mizera stato, en kiu hodiaŭ troviĝas la civilizita mondo, estas la nekompreno kaj la malkonfido, kiu apartigas la popolojn unu de la alia.

Ni estas konvinkitaj, ke la nuraj certaj sanigiloj de tiuj ĉi malbonoj estas la edukado al humanismo kaj la realigo de la interproksimiĝo de la popoloj. Je la servo de tiuj ĉi idealoj staras la Ligo de Nacioj.

Ni konsideras ke unu el la plej efikaj helpiloj por atingi solvon al la problemo de la rekonstruado de la mondo estas la internacia helplingvo Esperanto. Kaj ni estas konvinkitaj, ke ĝi devus ekhavi lokon, flanke de ĉiuj naciaj kulturlingvoj, en la studprogramoj de ĉiuj civilizitaj landoj.

Ni deziras konatigi al vi la konkludojn al kiuj ni alvenis per la spertoj rilatantaj al la instruado de Esperanto en lernejoj de la plej diversaj landoj.

Ni konstatis, ke Esperanto tute plenumas la praktikajn postulojn de internacia lingvo; ĝi estas taŭga, kaj parole kaj skribe, por ĉiuj celoj kiujn lingvoj plenumas. Krome, Esperanto havas rimarkindajn ecojn, kiuj donas al ĝi eksterordinaran edukan valoron.

Esperanto donas valoran helpon por la korekta uzado de la propra lingvo. Tio montriĝas je pli korekta prononcado kaj akcentado de la propra lingvo, je pli bona elektado de vortoj, kaj je pli klara kompreno de gramatikaj reguloj.

La scipovo de Esperanto faciligas la alproprigon de modernaj kaj klasikaj lingvoj, kaj ĝi faciligas la laboron de instruistoj, ĉar ĝi komprenigas la gramatikajn formojn pere de sia klara strukturo, havigas internacian vortprovizon, kaj kapabligas la lernantojn por sin esprimi en pli ol unu lingvo.

Laŭ nia opinio, Esperanto devus esti instruata al geinfanoj kiel la unua lingvo post la gepatra, kaj ĝi devus esti enkondukata en la programaron de elementa edukado. Tio donus al ĉiu lernanto kiu devus forlasi la lernejon, sufiĉan scion je kio rilatas al praktika uzado de dua lingvo. Tio ankaŭ montrus, ĉu tiuj, kiuj iras al mezlernejo, havas sufiĉan kapablon por postaj lingvistudoj, kaj sendus ilin al tiuj studoj kun sufiĉe preparita intelekto. Pere de tio ekestus granda tempoŝparo kaj pli bonaj rezultoj je la alproprigo de fremdaj lingvoj. Tiuj kiuj ne sufiĉe taŭgas por lingvolernado povus sin dediĉi al por ili pli konvenaj studoj.

Ni konstatis je niaj gelernantoj, ke Esperanto kondukas al pli profunda kono kaj valorigo de geografio, mondhistorio kaj principoj de morala edukado. Krome, ĝi vekas je ili pli grandan kaj simpatiplenan interesiĝon pri fremdaj popoloj kaj por ties kutimoj, literaturo kaj arto. Esperanto edukas por la monda paco, kaj semas je geinfanoj la idealon de unuiĝo de nacioj. Je la atingo de ĉiuj ĉi efikoj ludos ĉefan rolon la interŝanĝo de leteroj, bildkartoj kaj desegnaĵoj inter geinfanoj de diversaj landoj, same kiel la legado de esperantaj ĵurnaloj kaj la pristudo de fremdaj literaturoj. La gelernantoj jam post kelkmonata lernado kapablas komenci korespondadon. La morala avantaĝo de korespondado kun multaj landoj estas ege signifa.

La gelernantoj, pere de unuhora leciono dufoje semajne, povas atingi en unu jaro tian praktikan lingvokonon de Esperanto, kian tute ne eblas akiri je iu ajn alia lingvo eĉ dum tri jaroj.

Post tre seriozaj prikonsideroj, ni lanĉas tiun ĉi Manifeston al vi, kore rekomendante ke vi antaŭenigu en viaj landoj la Esperanto-instruadon, ne nur pro ĝia utilo por komerco, scienco kaj aliaj branĉoj de la spirita vivo, sed ankaŭ pro ĝia granda interna morala valoro, kiel instigilo al la amika kaj amoplena interpopola rilatiĝo, kiu estas la vera celo de la Ligo de Nacioj.



NOTICIAS FUNDAESPERANTO

Visita al Presidente de la Sociedad Bolivariana: Andrés Turrisi, Jorge Mosonyi y Teresa de Villasmil, visitamos en octubre al Coronel Arturo Castillo, quien es el Presidente de la Sociedad Bolivariana de Venezuela, para solicitarle sus buenos oficios en el sentido de que esa Sociedad publique cuatro documentos de Simón Bolívar, traducidos al Esperanto por miembros de Fundaesperanto y Asociación Venezolana de Esperanto. Al respecto el Cnel. Castillo nos dijo que es el Directorio quien toma decisiones de esa naturaleza, pero que, para motivarlo, podría publicar en el próximo número de la revista de la Sociedad, un artículo con el título tentativo “El Esperanto en deuda con Simón Bolívar” y una microbiografía de nuestro Libertador en Esperanto y español.

Exposición del Libro en Esperanto: Durante los días 23 y 24 de noviembre se realizó una exposición del “Libro en el idioma universal Esperanto”, en la biblioteca del Instituto de Mejoramiento Profesional del Magisterio, de la Universidad Pedagógica Experimental Libertador. Se expusieron libros, revistas, periódicos y otras publicaciones y se proyectaron constantemente películas relacionadas con el Esperanto.

El acto fue inaugurado por el Subdirector de Extensión, Prof. Manuel Sony León, quien resaltó la importancia de esta actividad como difusora de la cultura y como factor integrador de nuestra comunidad, y asomó la posibilidad de realizar exposiciones como ésta en otros núcleos del IMPM-UPEL.

Contamos también con el apoyo de la Coordinadora del Programa de Atención al Profesor Jubilado, Profesora Petrica Suniaga; del Presidente de la Asociación de Profesores Jubilados, Profesor Oscar Luque, de la Jefa de la Biblioteca, Licenciada Nelly Herrera, entre otras personalidades, y con la asistencia de profesores y personal administrativo y obrero de esa casa de estudios y de miembros de nuestras asociaciones AVE y Fundaesperanto. La Presidenta de Fundaesperanto dio las gracias a todas las personas que hicieron posible esta exposición y manifestó su satisfacción por el éxito de la actividad y reiteró su disposición de continuar trabajando por la difusión del Esperanto en nuestro País.

A nuestros amigos y asociados: La directiva de Fundaesperanto invita a nuestros asociados a colaborar con los programas que planifica la Fundación en pro del cumplimiento de su objeto, así como a pagar la cuota establecida.

Por Fundaesperanto, la Junta Directiva:

Presidenta: Teresa Osorio de Villasmil
Secretario Gral.: Andrés Turrisi
Tesorero: Esperanza Pérez

Vocales: Jorge C. Mosonyi
Esteban E. Mosonyi
Juan E. Bachrich

LA RENKONTO

Neniu venis sur la vojo. Ĉio estis silenta kaj senmova kaŭze de la varmega tagmeza suno. La vojo laŭiris la montojn, ĝi brilis jaŭne inter maizkampoj kaj foje malaperadis sub la ombroj de la densaj mangarboj. Malmultaj nuboj ŝvebis tra la bluega ĉielo. Pro la manko de vento, neniu folio moviĝis. Neniu krio, voĉo, birdkanto estis aŭdebla. Nek la akvo sonis.

Nur la hundo venis sur la vojo. Ĝi trotis lace. Ĝi estis malpura, ruĝhaŭta kaj terkovrita. Ĝi ŝajnis seka terbulo. Ĝi estis maldika, osteca, senhara, angul-muzela kaj hok-vosta. Ĝia seka kaj griza lango, estis preskaŭ malpura kiel ĝia haŭto. La suno speguliĝis brilante sur ĝiaj larmaj okuloj. Tra ĝia maldensa hararo, oni povis vidi cikatrojn sur ĝiaj oreloj, kruroj kaj torso.

Kelkfoje ĝi haltis ĉe la ombro de iu arbo, tiam ĝi ŝajnis iu terbulo kamuflita sur la vojo. Nur ĝia anhelado perturbis la kvietecon. Baldaŭ la hundo daŭrigis troti.

De malproksime, inter polvnebuloj, venis bovaro kaj homoj rajdantaj surĉevalo. La hundo ne haltis kaj plu alproksimiĝis trotante. Kiam la polvo kaj la bruoj de la bovoj kaj la voĉoj de la bovistoj estis proksimaj, ĝi turniĝis al maizkampoj kaj daŭrigis senhalte sian marŝon laŭlonge de iu sulko. La longaj kaj tranĉigaj folioj glitis sur ĝia dorso.

Denove ĝi turniĝis al la vojo. Tiam la polvo malaperis. La voĉoj kaj bruoj ne estis aŭdeblaj. La bovoj jam pasis. Nur restis ĝia trotado tera laŭ la tuta vojo.

Trotante vojflanke la hundo alproksimiĝis al iu mizera kabano. Ĝi statis inter malaltaj arboj. Ĝi paŝis fronte al ĝi. Oni povis vidi neniun homon. Ĉeestis iu dormema ĉevalo, ligita al iu paliso apud la kabano. Ankaŭ ĉeestis iu porko dormanta sub la suno kaj apud iu malplena lavtrogo. Kaj iu hundo kiu kuŝis apud la ĉevalo, levis sian kapon kiam vidis ĝin, tuj minacante montris siajn dentojn kaj furioze graŭlis.

Ĝi jam estis transpasinta la mizeran kabanon kaj nun la vojo malfermiĝis senobstakle inter la sunbruligitaj maizkampoj. Ekblovigis venteto. Oni povis aŭskulti la bruojn de la folioj. Kaj polvo blovis sur la vojo.

Pliantaŭe malfermiĝis iu ŝtonplena kaj sinua vojeto. Ĝi ŝajnis senakva rivero. Je la fino de la vojeto oni povis vidi kelkajn arbojn kaj iun verdan kaj densan kamparon.

Ĉi tie ĝi haltis momente. Tiam ĉesis la malrapida trotado. Ĉi tie la hundo ne serĉis alian direkton, ne flaris. Ĝi deturnis sin kaj pluiris laŭ la vojeto. Nun kelkfoje ĝi levis unu el siaj kruroj kaj saltis sur la aliaj tri kruroj. Ĝia vosto moviĝis kiel iu seka arbbranĉo.

Kiam ĝi atingis la kamparon, ĝi metis sin sub kelkajn arbojn kaj alproksimiĝis al iu malklarakva flako. Ĝi langumis akvon rapide. Kelkaj ondoj aperis sur la akva surfaco. Kaj sur la ondoj speguliĝis la bruna makulo kun la arbomboj sub brila ĉielo.

Sed ĉi tie ĝi ne haltis. Ĝi daŭrigis same troti, grimpante la monteton kaj ree laŭiris la ĉefan vojon. Nun ĝia lango pendis freŝa kaj malseka. La ombro longiĝis sur la ĝia flanko. Ĝi daŭrigis sian troton senhaltante. Ĝi ne rigardis la arbojn. Ĝi ne rigardis la verdajn liniojn de la lacertetoj kiuj trairis la vojon kaj poste kamufligis kun la sekaj folioj. Ĝi ne rigardis la mizerajn kabanajn kiuj statis flanke de la vojo.

Ĝi nur haltis kaj ekrigardis kiam ĝi vidis tiun altan arbon, kiu havas blankan trunkon, malmultajn foliojn. Sur ĝi kaj sub la brila suno staris

multaj vulturoj. La kvietaj birdoj plenigis la branĉojn de la arboj. Ili ŝajnis senvivaj.

Ĉi tie la hundo haltis. Ĝi levis sian kapon kaj malfermis vive siajn okulojn.

La brila sunlumo speguliĝis sur la plumoj de la vulturoj. Kun iliaj klinitaj kapoj ŝajnis ke ili dormis. Sed la hundo daŭrigis rigardi ilin fikse.

Ĝi daŭre rigardis ilin, kaj poste laŭiris paŝe kaj rezolutece iun vojeton kiu pasis apud la arbo. Ĝi paŝis apud la trunko. La vojeto iris sinue inter torditaj arboj. Ĝi daŭrigis paŝe laŭ la vojeto ĝis ĝi haltis fronte al iu kabano farita el pajlo. Oni ne povis vidi aliajn hundojn, bestojn nek homojn. Ĉio estis pli tranquilla ĉi tie ol ĉe la vojo.

La hundo sidiĝis apud iu malnova palisaro. Kun siaj kruroj ligitaj, sia kapo levita, sia maldika korpo streĉita, ĝi rigardis fikse la kabanon. Ĉe la pordo de la kabano neniu bruo estis aŭdebla. Ĝis iu eta knabeto aperis tra la pordo. La hundo levis siajn cikatroplenajn orelojn.

Li estis nuda. La suno brilis sur lia kapo, sur lia bruna haŭto kaj sur lia granda ventro. Li iris rapide sed sendirekte. Liaj senŝuaj piedoj faris markojn sur la polvo. Li iris turne, kliniĝis por preni kelkajn ŝtonojn aŭ falitajn arbranĉetojn. Ĝis li vidis la hundon.

Tie li haltis. Li estis proksime al la hundo. La hundo rigardis fikse lin. Unue li gestadis per siaj brakoj kaj faris voĉajn bruojn. Li alvokis ĝin, sed la hundo ne iris kun li. Tiam li diris raŭkavoĉe: -Prenu, hundeto. Prenu, hundeto.

Li alproksimiĝis pli kaj alvenis apud ĝin. Li kauriĝis kaj ekkaresis ĝian kapon, dorson kaj ostan voston. La hundo malfermis la buŝon oscedante kaj turniĝis apud li. La knabeto fosis la teron per iu lingnopeco kaj parolis.

-Mi nomiĝas Nikasio. Mi estas ĉasisto, bona ĉasisto.

Li prenis iun ŝtonon kaj ĵetis ĝin al la kamparo. La hundo sekvis ĝin per sia kapo.

-Tio estas nenio. Mi ne eraras kiam mi ĉasas lacertetojn. Kiam ili montras sin en la monteto, mi ĵetas ŝtonon al ili. Vi vidis.

Li leviĝis kaj iris en la direkto de iuj ŝtonoj kiuj estis malantaŭ la kabano. La hundo restis atendente lin.

Li jam revenis kaj portis ion en la mano. Tio ŝajnis iaj sekaj branĉetoj. Li lasis tion sur la teron apud la hundo, kiu proksimigis sian muzelon kaj flaris tion. Tio estis la skeleto de iu lacerteto kiu havis kelkajn erojn de seka haŭto.

-Mi scias ĉasi pavinojn. Mia paĉjo ĉasas ilin kaj mi ankaŭ. Oni fajfas por ili tiel.

Inter liaj dentoj li faris iun mallongan kaj modulitan fajfon kiu ŝajnis malkontenta birdkanto. Poste li prenis iun ŝtonon kaj ĵetis forte ĝin kontraŭ la arbojn kie ĉeestis la vulturoj. Unu el ili etendis la flugilojn kaj forflugis malrapide.

-Tiel mi ĉasas la pavinojn. Ĉu vi observis?

Poste li rerigardis pensante kaj silente la hundon. Ĝi sidis sur sia postaĵo. Ĝi sekvis lin per siaj okuloj.

-Vi ne estas ĉashundo. Vi ne havas ties orelojn. Vi ne scias ĉasi vulpon. Se vi estus vulpĉasisto, mi portus vin al mia paĉjo. Se vi estus cervĉasisto. Nokte venas la didelfo tra tiuj arbetoj por manĝi la kokinojn de mia patrino. Ni eliras el la hejmo portante bastonojn kaj kandelojn. Kaj mia paĉjo kun sia pafilo. Se vi estus ĉashundo vi irus kun ni.

Li denove prenis iun ŝtonon kaj ĵetis ĝin kontraŭ la arbetojn. Mane kaj voĉe li instigis la hundon kvazaŭ tio estis ĉasaĵo.

-Prenu! Prenu, ĉasisto!

La hundo atente stariĝis sed ĝi ne iris serĉi la ŝtonon.

-Vi devas lerni ĉasi. Por veni kun mi, vi devas esti ĉashundo.

Venis iu virino sur la vojeto. Tuj la knabeto kaj la hundo sciis pri ŝi. Ŝi portis iun korbon sur sia kapo. Ŝi kaj ŝia voĉo alproksimiĝis:

-Kion vi faras ĉi tie kun tiu skabia hundaĉo? Iru, hundo!

Li minacis preni iun ŝtonon. La hundo kuris al la arbetoj. Tie ĝi haltis, kaj kaŝis sin momente. La knabeto eniris en la kabanon kun la virino. La hundo alproksimiĝis ree al la kabano. Poste ĝi haltis kaj rigardis fikse la kabanon. Post longa paŭzo la knabeto aperis tra la pordo. Li portis ion en sia mano kaj aproksimiĝis al la hundo. Li portis sentenilan kaj malpuran tranĉilon parolante kun si mem, kvazaŭ kantetante. La hundo alproksimiĝis al li.

-Mi havas ... Mi havas tranĉilon ... tranĉilon ... ĉastranĉilon.

Li montris la tranĉilon kaj kantetis: -

Ĉastranĉilo ... por ĉasi vulpon ... kaj cervon... kaj sciuron... Mia tranĉilo. Mi estas ĉasisto. Li kantetis kaj piediris rigardante la tranĉilon. La hundo eksekvis prudente lin. Kun la sono de sia voĉo, li ŝajnis absorbita de siaj pensoj.

-Kiu venas kun mi? ...ĉasi kun la tranĉilo ...ĉasi vulpon ... Kun la tranĉilo ... Kiu venas kun mi?

Li eliris el la kabano kaj ekeniris en la kamparon. La hundo sekvis lin. Lia silueto forviŝiĝis inter la arbetoj, je la verda soleco malfermita al la suno.

Unu post la alia, la lastaj vulturoj de la arbo ekflugis kaj suriĝis en la ĉielon. Malproksime, ĉe la montoj, oni povis vidi tra la klara matena aero, multajn vulturojn flugantajn cirkle.

Estis aro da viroj kaj virinoj inter la kabano kaj la arbo. Ili parolis, gestadis. Oni aŭskultis bedaŭrojn.

-Ni serĉis en ĉiuj kabanoj.

-Ni serĉis ĉie.

-Kie estas la knabeto?

Iuj terlaboristoj diris al la ploranta kaj ŝrumpinta virino kiu staris apud la pordo de la mizera kabano:

-Ne afliktiĝu. Ni trovos vian knabeton.

Unu inter ili montris fingre al la vulturoj kiuj cirkle flugis malproksime.

-Rigardu. Rigardu la vulturaron, kiu cirkle flugas.

Tuj ĉiuj kapoj turniĝis al la malklaraj makuloj kiuj flugis ronde malproksime en la ĉielo.

-Iu bovo estas mortinta.

-Ĉu estas mia knabo, kiu suferis akcidenton en la kamparo?

Tion diris iu alta viro kun angora vizaĝo. Iu homo respondis al li:

-Ni vidos. Baptano. Dio ne volu tion!

Ĉiuj kune eniris en la kamparon. Ili rigardoj estis altaj kaj sekvis la cirklan flugon de la vulturoj. Ili ŝvebis en la aero kun siaj senmovaj kaj etenditaj flugiloj. Kelkfoje oni aŭdis kelkajn raŭkajn voĉojn kiuj flugis sendirekte:

-Nikasio!

-Nikasio!

Kelkfoje oni aŭdis la bruon de iu bovido, kiu fuĝis terure el la kamparo. Poste ĉio peze silentiĝis.

Ili alproksimiĝis al la vulturoj. Ili cirkle flugis. Tiuj kiuj flugis pli malalte preskaŭ tuŝis la surfacon de la tero. Ili havis siajn piedojn malfermitaj por alteriĝi.

-Li neniam foriris de la hejmo. Li ĉiam restis en la ĉirkauaĵoj. - Diris ree la ploranta virino.

Kiuj estis antaŭe diris:

-Tie! Tie li estas!

Ĉiuj kuris tien. Ili alvenis al la bazo de iu pura kaj pajlplena monteto. Tie, la vulturoj, kiuj flugis pli malalte, estis amasiĝintaj sur unu punkto, preskaŭ tuŝante la korpon de la knabeto. Ili ne alteriĝis ĉar apud la korpo de la knabeto ĉeestis iu ruĝhaŭta hundo kiu barkis kaj malaprosimigis la vulturojn. La knabeto ne moviĝis.

La grupo haltis. Kaj oni aŭskultis la rompitan voĉon de la patro:

-Mia knabeto. Li mortis. Sankta Dio!

Li alproksimiĝis saltante sekvita de la aliaj. La hundo vidis ilin alproksimiĝi kaj fuĝis timeme kaj sole ĝis ĝi malaperis en la kamparo. Li estis kuŝanta kun siaj malfermitaj okuloj fiksitaj kaj sia granda ventro supre. Ĉirkaŭ li la voĉoj, la ploroj. La vulturoj alproksimiĝis reflugante.

* Elstara literaturisto venezuela (16.05-1906 - † 26.02.2001).

SAĜECAJ EROJ

La homoj kiuj ne estigas bruon estas danĝeraj.

Nur la stultuloj kredas ke ili ĉiam pravas.

Eĉ la turoj plej altaj ekstaras sur la grundo